

# Rio Esperantista



ASOCIO ESPERANTISTA  
DE RIO-DE-JANEIRO  
aprilo – majo 2014

*Kultura Revueto*

*De*



Preêjo “da Penha (monteto)”

# OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEIRO

aprilo – majo 2014

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★

☎ 2467-4296 – ✉ aerjrj@hotmail.com e [www.aerj.org.br](http://www.aerj.org.br)

Redaktas: *Paulo Sérgio Viana*

Aranĝas: *Alfredo Araújo*

---

## RIO ESPERANTISTA

### VORTOJ DE LA REDAKTORO

Kun granda ĝojo ni komencas ricevi de bonvolemaj legantoj reagojn pri nia bulteno “Rio Esperantista”.

José Roberto Tenório, Prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, skribas por komenti pri la grafika aspekto kaj pri la disvastigo de nia bulteno. Dankon!

Estrarano de AERĴ pri junulara movado, Allan Argolo, siavice proponas interesan kontribuon. Li ŝatus republikigi tekstojn aperintajn en malnovaj numeroj de nia bulteno. Efektive, jen tio estas bona ideo, ĉar ĝi povas montri la historian valoron de AERĴ kaj de ĝia organo. Krome, ĝi povas transdoni al la novaj generacioj perspektivon de nia movado laŭ historia vidpunkto. La legantoj certe konstatos, ke multaj problemoj de nia movado ne estas novaj, male. Certe tio inspiras la inteligentajn kapojn de niaj samtempuloj trovi novajn solvojn por malnovaj baroj. Ni jam invitis samideanon Argolo prizorgi tiun novan rubrikon inter niaj paĝoj. Eble ĝi povus ricevi la titolon “Nostalgio”.

Laste, ni emfazu la gravecon, ke “Rio Esperantista” daŭrigu sian vojon kiel grava tradicia publikaĵo en Brazilo. Ni forte esperas, ke ĝi fariĝos pli granda kaj riĉenhava. Sed tio ne dependas nur de la redaktoroj – ĝi dependas grandparte de la legantaro.

—*P.S.V.*

---

### VORTOJ DE LA ESTRARO

Karaj samideanoj, ni profitas la okazon por omaĝi samideanon kiu multe helpis nin, sinjoron Jorge Campos Oliveira. Kiel la plejmulto el ni scias, ni sukcesis aĉeti nian sidejon ĉar li donacis grandan monan sumon. Ni estis sendomaj, kaj certe la movado en Rio-de-Janeiro riskis perdi sian forton, sen sidejo por AERĴ. Li forpasis en la 2a de februaro.

Ni informas ke niaj kunvenoj kaj klopodoj por organizi la Brazilan Kongreson daŭras kaj tuj ni informos pri la sidejo de la evento al la samideanoj krom aliaj novaĵoj. Nia espero estas pri bona, festa, distra kaj kunfratiga kongreso.

Pri la kampaĵo por disvastigi Es-

peranton en la famkonata libro-foiro de Rio-de-Janeiro, ni marŝas malrapide sed firme. Ni dankas al ĉiuj kiuj helpas, helpis kaj helpos nin.

Bedaŭrinde nia paĝo en la reto ne estas plu funkcia. Oni invadis ĝin, kaj tio kaŭzis problemon, kaj ne eblas uzi plu la paĝon. Ni preparas novan retan paĝon kaj ĉe la mezo de aprilo ni jam devas havi novan.

Finante ni skribas, ke estas motivo de granda feliĉo por ni informi ke en

majo finfine ni havos Eksterordinaran Asembleon en nia sidejo por enpostenigo de la nova estraro laŭ nia nova statuto. Marcio Santos, prezidanto; Allan Argolo, vicprezidanto; Benedito Pereira, sekretario; Seldio Langone, financa direktoro; Fernando Pita, eduka direktoro; Maira Nobre, disvastiga direktorino; Aristides Pereira, Renan Lyra kaj Rosa Amatuzo, fiska konsilantaro; Gastão Casper kaj Alvaro Motta anstataŭantoj.

---

## ĈU VI ALIĜIS AL AERĴ POR 2014? ANKORAŬ ESTAS TEMPO!

---

### IOM DA SCIENCO

Estas konsilinde kontroli koleron

---

De longa tempo oni scias, ke emociaj streĉoj influas la homan sanstaton.

Novaĵo nun estas, ke sciencistoj statistike kalkulas tiajn aferojn.

Esploristoj el la usona Universitato Harvard ĵus publikigis studaĵon, en kiu ili asertas, ke la risko je korinfarkto aŭ ikto (cerba arteria ŝtopiĝo) post forta kolero estas tre granda. Post analizado de naŭ aliaj esploroj el diversaj medicinaj centroj, ili kalkulis, ke tiu risko je korangiaj problemoj estas preskaŭ kvinobla, se oni komparas ĝin kun okazoj, kiam oni estas en normala animstato. Koncerne la cerbajn sangocirkulajn problemojn, la risko estis

proksimume triobla. La studo inkluzivis pli ol 4000 pacientojn inter la jaroj 1966 kaj 2013. Kompreneble, tiu risko estas pli granda, se la paciento jam suferis antaŭe malsanojn de koro aŭ cerbo. Tamen, ili observis, ke la okazoj de furioza kolero kaŭzas en la homa korpo akumulajn fenomenojn, tiel ke la risko iom post iom kreskadus. Oni ankoraŭ ne scias precize, kiu estas la kaŭza rilato inter kolero kaj tiuj malsanoj. Supozeble, temas pri la fakto, ke dum koleraĵ momentoj la sangopremo kaj la korbatoj ŝanĝiĝas en negativa maniero.

---

*“Iru al la formiko, vi maldiligentulo; rigardu ĝian agadon, kaj saĝiĝu. Kvankam ĝi ne havas estron, nek kontrolanton, nek reganton, ĝi pretiĝas en la somero sian panon, ĝi kolektas dum la rikolto sian manĝon.”*

---

*(La Sentencoj de Salomono, trad. L.L. Zamenhof.)*

## ESEO

### ĈU ESTAS LOKO POR LA ALTSTILA ESPERANTA NIVELO EN LA NUNTEMPA KIBERNETIKA TEKSTARO?



Josenilton kaj Madragora

Ĉu eblas akiri nuntempe belstilan lingvonivelon sine de la esperantista popolo, kiu vivas alkroĉita ĉefe al la bildekrana tekstaro? Ni konstatas, ke la rapide furora kaj faciluza utileco kaj praktikeco de Esperanto draste influas kontraŭ la uzo de la formala kaj klera nivelo flanke de la esperantistoj forĝitaj en Interreto, kaj, en la nuno, tiu ĉi komunumo formas la plimulton el la esperantuzantoj.

Nu, komence ni bezonas reliefigi, ke ĝeneralsence, ni estas kontraŭ ia ajn lingva antaŭjuĝo, jen la antaŭjuĝo kontraŭ la popolaj dirmanieroj, jen kontraŭ la altstilaj dirmanieroj. [Ni klarigas, ke ni aparte ne regas kiel konvene la bonan lingvonivelon, sed ni almenaŭ ĉiam klopodas imiti la grandulojn pri gramatikaj normoj kaj dirmanieroj (eĉ se penante ne fali en la tedan pedantismon). Ni defendas la tezon, ke estas preferinde erari tie kaj tie, provante senĉese atingi la supron, ol eradi kaj lamadi ĉie kaj ĉie, ordinaracĉe, en la stagnemiga malsupro.] En principo, ĉiu uzu la lingvon, kiun li konas kaj volas uzi, libere kaj sen ĝenoj. Pli gravas la komunikeco de la lingvo.

Sed rimarkeblas, kiel fakto, ke estas du seriozaj neŭrosociaj fenomenoj, kiuj estas emantaj forgesigi onin pri la Esperanto-modelo postlasita de la

grandaj verkistoj el la pasinteco. La unua estas la dezirego “paroli skribe” per la modernaj virtualaj komunikiloj, kio faras multajn homojn eĉ fluaj uzantoj de la lingvo, sed samtempe ekstreme neglektemaj kaj malatentemaj rilate la stilon de la majstraj verkistoj, kiuj estas baze la veraj gramatikistoj kaj stilnormistoj de Esperanto. [Tio ne volas diri, tamen, ke la baza lingva stilo de Esperanto ne devas evolui nek rigardi al la estonteco. La kritika demando estas, ke nuntempe noteblas influo de nenia stilo, nek pasea nek futurisma.]

La dua fenomeno estas, ke neniu plu legas presitajn esperantajn librojn, nek klasikajn nek modernajn, kaj tio emas transformi Esperanton en malbelan aŭ eĉ monstran lingvon, post eble 30 jaroj. Pri la graveco de la presitaj libroj ni publikigis, antaŭ kelkaj monatoj, artikolon en *Recanto das Letras*<sup>1</sup>, sed ĝi eĉis tre malforte.

La iama zorgo, ke Esperanto ne distransformiĝu en dialektojn, substituiĝos al tio, ke ĝi ne transformiĝu en senstilan, sengramaktikan kaj malelegantan lingvaĉon, pro manko de alirado al modelaj tekstoj.

[Alia grava problemo estas, ke ne ekzistas reviziistoj de amatoraj esperantaj tekstoj. Ni eĉ provis starigi aso-

cion de reciprokaj reviziantoj<sup>2</sup>, sed preskaŭ neniu akceptis la defion.]

Ĝis antaŭnelonge Esperanto estis alirata ĉefe tra la literaturo kaj tra didaktikaj libroj. Nuntempe, tamen, la lingvo jam estas sufiĉe vaste legata kaj parolata en Interreto (ĉefe post la retkursoj), kaj la homoj jam avide ekkomunikigas en Esperanto, surbaze nur de kelkmonata lernado, profitante la facilan regadon de la baza tujposta komunikiga nivelo. Sed, tamen, ĝuste pro tiu rapida baza komunikebleco de la lingvo, oni emas preterlasi la konstruadon de firma kaj norma stilo, kiun nur la libroj legataj dum multa tempo kutimas provizi.

Kaj nun? Kion fari? Ĉu silenti antaŭ la ĉiesa svarmo da stilaj malbelaĵoj kaj gramatikaj krudaj eraroj, favore al la lingva demokratio, aŭ vigle kampanji por la ellernado de la lingvo per la bonaj gramatikoj kaj stilmodelaj presaĵoj?

Kaj ĉio tio por ne paroli pri la epidemio de forgesemo kiel rezulto de la magnetaj tempestoj kaj de la postmodernaj kolektivaj stres-statoj, kio postulus kongresgrandan kolokvon por kompreniĝi.

Ĝustatempe, rimarkindas, ke paroli ĝuste ne estas paroli nepre malfacile.

La tuta esperanta gramatiko estas tiel genie strukturita, ke ĝi ebligas, ke oni esprimiĝu ĝuste per diversaj niveloj de gramatikeco. Multaj homoj esprimiĝas klare kaj bone dum la tuta vivo,

lerninte nur la bazajn regulojn, dum aliaj same esprimiĝas per la pli profundaj kaj altstilaj reguloj de gramatiko kaj de stilstiko. Kaj la baza kaj la supera regularoj estas elaste sufiĉaj por la ĉiutaga esprimado, depende de ĉiu individua gusto, emo, prefero, bezono aŭ eĉ personeco.

Paroli kaj skribi sufiĉe bone, simple kaj klare en la baza nivelo estas agrabla al ĉies intelektuloj. Tio estas arto plej ofte regata nur de tiuj genioj pri la simpleco aŭ de tiuj sindediĉaj legantoj kaj skribantoj de la lingvo, tio estas, de tiuj, kiuj bezonis multe poluri sian stilon, por atingi la supron de la simpleco.

“Neniu iluziĝu: oni atingas la simplecon nur post multa laboro.” – Clarice Lispector

Plej grave estas, ke ĉiu el ni praktikadu senĉese la lingvonivelon, kiun ni jam akiris, skribe kaj parole, sed ĉiam faru klopodojn por ellerni la lingvon, de la punkto, kie li estas ĝis la senfino, apogante sin sur la klasikaĵoj de la alta literaturo kaj esplorante la gramatikon en ties ĉi niveloj kaj eblecoj, senĉese, sen feria tago, ĉefe se li intencas postlasi al la aperanta inteligentega generacio la Esperantomodelon, kiun L. L. Zamenhof, la plej inteligenta apriora lingvoiniciatinto de la tuta mondo, postlasis al la estonteco.

<sup>1)</sup> <http://www.recantodasletras.com.br/artigos/4546315>

<sup>2)</sup> <http://lotakaeme.blogspot.com.br/2013/11/necesas-en-la-e-movado-klubo-au-asocio.html>

“Korfavoru min”.

“ne en via kolero min riproĉu, kaj ne en via furiozo min punu”.

“Por scii saĝon kaj moralinstruon”.

*(La Sentencoj de Salomono, trad. L.L. Zamenhof.)*

---

## KIAL BIRDOJ RIPOZAS SUR ELEKTRODRATOJ KAJ NE RICEVAS ŜOKON?



*Genilda M. Coelho*

Obervemaj infanoj ofte demandas siajn gepatrojn kaj instruistojn, kial birdoj sur elektrodratoj ne mortas. Jen la respondo: ĉar ili staras kun ambaŭ piedoj sur unu sola drato kaj ne tuŝas alian objekton aŭ surfacon. Tiel, la elektra kurento pasas tra la birdo, tiel ke ĝi estas parto de la elektra kurento.

La birdo estus elektrokutita se ĝi almetus po unu sia piedo sur malsamajn dratojn samtempe, ĉar tiam la elektra kurento rompiĝus. Se ni, homoj, tuŝus elektrajn dratojn havante niajn piedojn sur la tero, same rompiĝus la elektra kurento kaj ni ricevus la elektran malŝargon.

---

## KURIOZAĴOJ STRANGA ENKETO



Maurício Monken

Sportistoj ofete falas surteren dum futballudoj pro krampfo, nome tre dolora muskola spasma. Jen ordinara konstato, sed tiu simptomo same atingas aliajn homojn dum la nokto, kaj perturbas ilian ripozon. Kial tio okazas?

Nia medicino ne bone klarigas tiun malbonfarton, laŭ miaj konoj. Oni citas iujn kaŭzojn, sed la kuracado ne montriĝas tute efika... Interalie, oni proponas manĝadon de bananoj, pro la ĉeesto de substanco “kalio” en ĝi. Sed ne ĉiuj pacientoj ricevas per tio mildigon de siaj suferoj. Mia nevino iam asertis, ke sciencistoj esploris la aferon uzante bananojn kaj popularan trinkaĵon “Água tônica” (Toniga akvo). Ĉu pro kinino, nome substanco, medikamento kontraŭmalaria, kontraŭfebra kaj kontraŭdolora, kiun ĝi enhavas? Surprize, pli bonan rezulton oni trafis per la dua metodo.

Mia amiko Karlo, dum unu monato ĉiutage englutis la enhavon de unu ladskatoleto de tiu refreŝigaĵo, kaj dum tiu tempo ne suferis la terurajn dolorojn, kiuj ĝenadis lian dormadon. Poste li daŭrigadis la kuracadon, trinkante po unu skatolo en alternaj tagoj.

“Ĉu vi kredas tiun frenezajon?”, alia amiko demandis. Strangan enketon mi aŭdacis entrepreni hodiaŭ pri tiu “frenezajo”. Mi defias vin fari la teston, ripeti la sperton de Karlo, se vi suferas je krampfoj, kompreneble. Se vi malbonfartas pro tiuj doloroj, faru la samon, kaj se vi plensukcesos, tiam sciigu min pri via rezulto. Krome, mi proponas, ke vi ĵetu ĝin antaŭ la ventumilon de interreto... Jen mi donas mian adreson: [mmonken@uol.com.br](mailto:mmonken@uol.com.br). Mi atendas kaj mi dankas vin por via afabla ago.

Prosperon al vi! Ĝis!

---

## SIGNALOJ PRI ESTONTA MISVOJADO DE BANKKONTO



Edgar Massaaki Egawa

Vi uzas la tutan bankan kontlimon dum preskaŭ tuta monato. Via limo estas pli alta ol via salajro aŭ, kaj kiam la mono eniras en vian bankkonton, ĝi ne sufiĉas por kovri vian ŝuldon. Vi uzas ĉekon sen rezervi la monsumon.

Kiam la ĉeko estas redonita senpage al deponanto, anstataŭ pagi ĝin al via ŝuldanto, vi blokas la ĉekon. - Vi pruntas kaj repruntadas, provante pagi viajn aliajn ŝuldojn, aŭ nur pensante kion aĉeti per la mono. Vi deprenas el kredikarto por deponi je bankkonto. Vi petadas altigon de viaj banklimoj.

Vi akceptas ĉiujn bankproduktojn, kiujn oni ofertas por provi plialtigi viajn limojn, sed poste vi ne sukcesas pagi aŭ rompi ilin. Vi pagas nur la minimumon el la kredikarto. Vi transpasas vian kontlimon ĉiumonate.

Se vi ne havas limon, vi nuligas la monsumon je via bankkonto ĉiumonate. Kaj kiam vi forgesas depreni la tuton, la banko kolektas ĉion kion ĝi po-

vas je ŝulditaj tarifoj. Vi vin demandas, kien iris via ŝparmono. Vi aplikas iom da mono kaj baldaŭ vi deprenos ĝin.

### Kaj ke ĝi jam misvojis

Vi ekricevas pag-postulajn leterojn el la banko. Kaj poste, el pag-postulaj entreprenoj. Via kredikarto estas neakceptata kiam vi provas fari ian aĉeton. Vi ne plu sukcesas prunti, ĉar vi estas en listo de malbonaj ŝuldantoj, via kontlimo estis malaltigita aŭ via prunta debeta saldo estas tro alta. Malgraŭ la atentigoj, vi surpriziĝas kiam via kontlimo estis nuligita.

La pago de via prunto, la nuligo de via kontlimo aŭ io simila malpermesas vin ricevi vian salajron aŭ pension, aŭ ĝia plej grandan parton.

Kiam vi ricevas vian novan bankkarton, ĝi ne plu estas kredikarto. Vi jam ne havas monsumon aplikitan em la banko, nur ŝuldojn.

---

## RECENZETO

### “Jorge Luis Borges en Esperanto!”



P. S. Viana



J. L. Borges

La argentinano Jorge Francisco Isidoro Luis Borges Acevedo (1899-1986) estas brila nomo en la tutmonda literaturo. Diversaj fakuloj opinias, ke li (kune kun Proust, Joyce, Kafka) staras

inter tiuj, kiuj suferis plej frapajn maljustaĵojn flanke de la sveda akademio, kiu ne transdonis al li la Nobel-premion. Li estis senkompara erudiciulo, dediĉinta sin al fantastaj temoj, kiel spe-

guloj, labirintoj, kabalo, mitoj. Li amegis la librojn kaj multe verkis pri ili: lia “Biblioteko de Babelo” fariĝis universale konata. Alia ofta temo en lia verkaro estas Dio kaj ties mistero. Li verkis poemojn, eseojn, fikciaĵojn, ĉiam per tute personaj stilo kaj vidpunkto.

Estas do entuziasmige, ke aperas bela volumo da rakontoj kaj poemoj de la genia argentinano en nia lingvo: “La Sekreta Miraklo” (eldonejo Sezonoj, 2008). Ĝi estas nepre leginda libro, eĉ fare de tiuj, kiuj jam legis tiujn tekstojn en siaj denaskaj lingvoj

(Borges estas ja tradukita al multaj lingvoj). La libro perfekte taŭgus por pruvi la flekseblecon kaj esprimovon de Esperanto – se ankoraŭ ekzistus iu strangulo, kiu dubas pri tio. Teamo de eminentaj kompetentuloj plenumis la

taskon kun neriproĉebla talento, tiel ke la lingvo pulsas vivece kaj perfekte transdonas la rafinitan stilon de la aŭtoro. Kompreneble, ne temas pri tekstoj por komencantoj, ne pro ia aspekto de la traduko, sed pro karakterizaĵoj de la originalo mem. Sed mi pensas, ke kun iom da klopodo, eĉ ankoraŭ progresanta Esperantisto povas ĝui la tutan volumon. Eble plej granda baro troviĝas en la poemoj, kiujn oni devas legi kaj relegi, por atingi plenan komprenon. Jes, neologismoj abundas, sed mi ne opinias, ke ili estas troaj aŭ nepravigeblaj. (Cetere, ĉi tiu punkto provokas eternan diskuton.)

Persone, mi finis la legadon kun entuziasmo. Ĉi tiu libro meritas stari sur la bretaro de ĉiu Esperantisto, kiu amas altnivelan literaturon. Rapiidu al via preferata retbutiko kaj mendu vian ekzempleron!

---

## I O M D A P O E Z I O L A V U L P O



RETO ROSSETTI

*R. Williams-Parry  
Tradukis Reto Rosseti*

*Surmonte, dum kapelaj sonoriloj  
al suba valo vokis nin invite,  
kaj sun' julia per zenitaj briloj  
allogis al la supra – jen, subite,  
kun flua trot', silente, preterire  
la rava formo vojis sen konscio.  
Ni fulme ekrigidis, kaj senspire*

*staris en fikso, kvazaŭ ŝtonotrio  
sorĉita. Meze en la pas' serena  
ĝi haltis, mirtrafita. Flamoj du  
okulis nin super piedo ŝveba.  
Poste, sen timo, kun facila flu' ,  
trans supron glitis ĝia rufa felo.  
Okazis, ĉesis, kiel fal' de stelo.*

*(El 'Nova Esperanta Krestomatio')*

## RIDETU, BONVOLE ĈE LA BARBIRO

Post tondado de haroj, la barbiro prezentas spegulon, por ke la kliento aprobu lian laboron.

La kliento respondas:

- La hartondado estas perfekta. Al mi ne tre plaĉas la dekstra orelo, kiu ŝajnas al mi malpli granda ol la maldekstra.

